



Du imponaj atingoj!

Chantons  Kantu ni

BRASSENS

illustré par **BLAISE GUININ**




en **FRANÇAIS** en **ESPERANTO**

Finfine aperis la
«labordokumento»
de la Kompanoj por festi
la 100-jariĝon
de la naskiĝo de Brassens!

SAT-Kongresa prestiĝa
prezento:
la E-versio de
*La Damnitoj de la
Pariza Komuno*,
de Raphaël Meyssan,
subtekstigita
de Esperanto-Gironde.



LA DAMNITOJ DE LA PARIZA KOMUNO



2021: 150a datreveno de la Pariza Komuno.

La franca registaro decidis ne solenfesti tiun eksterordinaran, unikan historian eksperimenton. Tamen la amaskomunikiloj sin klinis al ĝi: inter marto kaj majo aŭdeblis radioelsendoj kaj videblis dokumentfilmoj pri la evento.

Iun el ili vidigis ARTE. Temas pri tre originala dokumentfilmo, kiun Raphaël Meysan faris el sia bildromano *Les Damnés de la Commune*. Ĝi estis ellaborita el gravuraĵoj el la epoko de la Pariza Komuno, sur kiuj li enkondukis rakontojn kaj dialogojn laŭ la memoraĵoj de Victorine Brochet, kiu reale partoprenis en la Komuno.

Tiu filmo estas ege korfrapa, emociiga. Pedro Sanz, spektinte ĝin, havis la ideon ĝin vidigi al la partoprenantoj de la SAT-kongreso de 2021. Li tion proponis al Marcelo, kiu trovis interesatajn membrojn de Espéranto-Gironde kaj Kompanojn por kunlabori en la adaptado de la filmo, tiel ke ĝi estu internacie videbla kaj komprenebla de la Esperanto-parolantaro.


Jen kiel progresis la afero.



Unue estis disbranĉitaj 10-minutaj pecoj de la filmo. La unua laboro estis aŭskulti la vortojn de la filmo (rakontojn kaj dialogojn) kaj kiel eble plej fidele ilin transskribi sur Excel-tabelon, kiu entenis ĉelojn po kvin sekundoj. La tuta filmo estas longa 1 horo kaj 27 minutoj...

Tiun laboron plenumis la unua skipo.

La dua laboro konsistis en la traduko de ĉiu dekminuta peco, fare de alia skipo. Nu, fakte oni povis aliĝi en ambaŭ skipoj (tiuj, kiuj transskribis la francan tekston, kaj tiuj, kiuj tradukis). Tio estis tre malfacila laboro: oni devis certigi pri vortoj, kiujn oni ne kutimas uzi (ekz.: «leurs uniformes sont faits de bric et de broc») aŭ trovi kontentigajn solvojn por sonludoj (ekz.: «Ferry-famine») aŭ idio-maĵoj (ekz.: «La parole est à...» dum la deputitaraj kunvenoj).



La tria laboro estis la harmoniigo de la tuta teksto. Tiu estis triparta:

Unue: Reaŭskulti la tutan francan version, por kontroli, ĉu la franca teksto estas senerara kaj logika. Fakte estis sufiĉe multaj misaŭditaĵoj (ekz.: «crieuse de journaux», kaj ne «plieuse de journaux», aŭ «Marchons sur Berlin !» kaj ne «Là !...»).

| 00:09:50 | | Damnitaj Komuno: Plj matgali definitiva traduko.xlsx | | | |
|----------|----------|---|---|---|--|
| A | B | C | D | E | |
| 1 | | Les damnés de la Commune | La damnitaj de la Pariza Komuno | La damnitaj de la Pariza Komuno | |
| 2 | | https://www.youtube.com/watch?v=rK7650_tHE&feature=youtu.be | | MIGUEL | |
| 3 | | texte du film | surtekstoj | surtekstoj | |
| 118 | 00:09:30 | De grosses larmes coulent sur ses joues. Une dernière fois, il l'embrasse. | Varmaj larmoj fluas sur liaj vangoj. Lastan fojon li kŝvas lin. | | |
| 119 | 00:09:35 | Puis il part. | Kaj li foriras. | | |
| 120 | 00:09:40 | L'armée prussienne va très vite. | La prusa armeo tre rapidas. | | |
| 121 | 00:09:45 | Le 19 septembre 1870, elle est aux portes de Paris. | La 19an de septembro 1870, ĝi staras ĉe Parizo. | | |
| 122 | 00:09:50 | | | | |
| 123 | 00:09:55 | Les Prussiens encerclent la capitale. La ville est assiégée. | La prusoj ĉirkaŭpremas la ĉefurbon. Ili siegas Parizon. | | |
| 124 | 00:10:00 | Nous étouffons à l'intérieur des fortifications. Les habitants des alentours se sont réfugiés dans Paris | Ni sufokigas interne de la fortikaj muroj. | Anstataŭigu "enloĝantoj" per "loĝantoj" | |
| 125 | 00:10:05 | | | | |
| 126 | 00:10:10 | avec leurs animaux et leur basse-cour. | kun siaj bestoj kaj kortobirdoj. | | |
| 127 | 00:10:15 | Une affiche de Georges Clémenceau, jeune maire du 18ème arrondissement nous redonne courage. | Afiŝo de Georgo Clémenceau, juna urbestro de la 18a kvartalo, rekurajigas nin. | | |
| 128 | 00:10:20 | "L'ennemi est aux portes de la cité. Nous sommes les enfants de la révolution. | "La malamiko staras rande de la urbo. Ni estas la infanoj de la Revolucio. | | |
| 129 | 00:10:25 | Inspirons-nous de l'exemple de nos pères de 1792 et | Nin inspiru la ekzemplo de niaj gepatroj en 1792 kaj | | |
| 130 | 00:10:30 | comme eux nous vaincrons." | kiel ili ni venkos." | "ni venkos kiel ili venkis" | |
| 131 | 00:10:35 | Ces mots de Clémenceau m'ont convaincue, je vais m'engager dans une ambulance de la Garde Nationale. La journée, je confierai mon fils à ma | Tiuj vortoj de Clémenceau konvinkis min. Mi rekrutiĝos en ambulanco de la Nacia Gvardio. Dumtage mi konfidos mian filon al mia patrino. | | |
| 132 | 00:10:40 | | | | |
| | 00:10:45 | | | | |

Due: Kontroli la lingvan ĝustecon de la traduko de ĉiu parto, modifi tion, kio estis modifenda, ĉu pro transskribaj eraroj, ĉu pro mistraduko de specifaj vortoj aŭ nocioj (ekz.: «Des grandes artères sont percées»: en Esperanto, oni ne «boras» sed «konstruas» avenuojn).

Trie: Harmoniigi la tuton: ĉiu vorto estu sammaniere tradukita, kiam ĝi havas la saman signifon, ie ajn en la teksto, inkluzive de la elekto pri minuskloj aŭ majuskloj, la esperantigo de la propraj nomoj de lokoj aŭ personoj, ktp. (ekz.: «la butte Montmartre» ne estu ie «altaĵo», aliloke «monteto»). Pri la nomoj de la lokoj estis komune decidite, ke la enPIVaj nomoj estu esperantigitaj, laŭ la PIVa formo, la aliaj restu en la franca (ekz.: placo Vendôme, Montmartre, ktp., sed Versajlo, Alzaco, Loreno...); kaj pri la nomoj de homoj, oni esperantigu la personan nomon, sed lasu la familian nomon laŭ la franca ortografio (ekz.: Geor-go Clemenceau, Leo Gambetta...). Do Victorine iĝas Viktorino.



Tiun laboron realigis tria skipo, kaj tio estis okazo de ege ardaĵ kaj klerigaj interŝanĝoj. La preskaŭ finan version kontrolis eĉ nefranclingvanoj, tiel ke ne restu en la teksto esperantaj francismoj.

Poste venis alispeca laboro, la plej tempovora kaj pedanta: la subtekstigo de la filmo. Tiu estis vere puntista laboro!... pli malpli du horoj necesis por pli malpli kvinminuta subtekstigo. Tiun laboron parto de la tria skipo plenumis dank' al specifa softvaro.

Post zorga kaj serioza plursemajna laboro de ĉiu, laŭ sia nivelo, aperis sufiĉe kontentiga verko, laŭ mi kvazaŭ profesia. Kompreneble restis kelkaj tre bone kaŝitaj eraretoj (ekz.: «Clémenceau» anst. «Clemenceau», sed la tuto vere belaspektis!

La nura problemo estis jena: neniu opiniis necese peti permeson de ARTE por traduki kaj poste diskonigi la filmon, okaze de la SAT-Kongreso. Kaj tio havis konsekvencojn... Sed tio estas alia afero, pri kiu raportas Marcelo, p.7.

Janine

LA DAMNITOJ DE LA PARIZA KOMUNO

- PREZENTO -



Rafaelo Meyssan

De la insurekcio la 18an de marto 1871 ĝis la «Sanga Semajno», kiu finiĝis la 28an de majo 1871, Parizo spertis popolan kaj demokratan ribelon. Rafaelo Meyssan mergas nin sine de tiu aparta revolucio dank' al miriga estetika aranĝo de tiutempaj gravuraĵoj.

Fine de la 1860aj jaroj Parizo muĝas. Meze de Dua Imperio, kiu sin volas liberala, Napoleono la 3a misiis la prefekton Haussmann modernigi la ĉefurbon, tiel ke ĝi fariĝu paradizo por altburĝoj. Dum mizero graviĝas kaj luprezoj altiĝas, la popola kontestado grandiĝas. Por firmigi sian aŭtoritaton, la imperiestro provas deturni la socian koleron kontraŭ eksteran malamikon kaj deklaras militon al Prusujo. Sed la konflikto fiaskegas. La 3an de septembro 1870 Napoleono la 3a estas kaptita. La imperio disfalas kaj la provizora registaro, instalita en Bordoza, decidas trakti pacon kun la Prusoj. En la sieĝata ĉefurbo la enloĝantoj rifuzas kapitulaci. Post baloto la Pariza Komuno estas proklamita la 28an de marto 1871 kaj dum 72 tagoj eksperimentas reformojn en plej diversaj kampoj: sociala, eduka, kultura politikoj, seksegaleco, laikeco... Rifuĝintaj en Versajlo sub impulso de Aldolfo Thiers, estrarĉefo, la adeptoj de la establita ordo remobilizas armeon pretan premmarŝi en Parizon...

Animplenaj arkivoj

Jen la Pariza Komuno, tiu demokrata kaj popola blovegimpulso, kiel ni ankoraŭ neniam spektis ĝin: Rafaelo Meyssan adaptis la tri volumojn de sia samnoma bildromano, por kiu li kolektadis centojn da gravuraĵoj el la tiuepokaj gazetoj kaj libroj. Sekve al tiu laŭmetoda traserĉo de arkivoj – ok jaroj da esplorado – la grafikisto kaj reĝisoro kreis unikaĵon, filmon kun neordinaraj prezentoj kaj kombinaĵoj. La kamerao vivigas tiujn belegajn desegnojn, kortuŝajn, subtile animatajn, kaj zomas, trarigardas kaj karesas por restitui tiun tragikan epopeon. Tiu admirinda artaĵo elmontras ĉiujn ajn detalojn.

La Komunanoj mortis antaŭ unu jarcento kaj duono, bombaditaj, pafitaj, arestitaj, deportitaj. Ili mortis kaj Historio ilin kvazaŭ neniigis. For tiujn insurgentojn plurcentmilope! Ili mortis kaj de ili postrestas nur ombroj sur paperoj. Rafaelo Meyssan ne provis ilin revivigi aŭ enkarnigi, li simple animis ilin. Lia filmo ne estas fikcio sed dokumentario kreita nur per tiuepokaj arkivoj. El presitaj ĉifonoj surekranigis la damnitoj de la Pariza Komuno. Ili, forpelitaj sur paĝojn de forgesita buĉado kaj de tretita respublika idealo.

Enŝovante la rakonton de Viktorino Brochet, juna ribelulino, kiu vere travivis la eventojn, jen flua priskribo, kiu sukcesas klarigi por ĉia publiko la ĥaoson de la Pariza Komuno.

Impulse de Pedro Sanz kaj Miguel Fernandez el Madrido, amika tradukrondo transskribis kaj tradukis la tekstojn de la filmo. Kunpartoprenis en tiu laboro André Arnold, Nicole Blot, ĴanSeb Brilleaud, Pjer Buvje, Janine kaj Yannick Dumoulin, Claudine Gueguen, Klodin' Pomiról, Marcelo Redulez kaj Nathalie Rigault.



La tuton harmoniigis kaj kontrolis Janine kaj Yannick Dumoulin. Ankaŭ Miguel Fernandez kaj Pedro Sanz. Yannick Dumoulin ankaŭ zorge instalas la subtekstojn sur la bildojn.

Kaj per tiu materialo Marcelo Redulez engaĝigis 52-paĝan ilustritan broŝuron.



Victorine Brochet apud
Louise Michel

Marcelo



La du volumoj de la bildromano de Rafaelo Meyssan

150 JAROJN POST LA KOMUNO, 100 JAROJN POST LA KREO DE SAT LA DAMNITOJ DUM LA SAT-KONGRESO 2021

La ĉi-jara SAT-kongreso okazis perrete pro la pandemio. La filmo, kiun finpretigis Yannick kun Janine, okupis la programon de la sabata vespero. La antaŭan tagon Xana el Portugalio, kompetente enretigis la filmon sur jutuba kanalo. Sed jam kelkajn minutojn poste, la ligilo sendita ne plu funkciis. TF1 argumentis mankon de aŭtorpermeso por bloki la aliron, kvankam la filmo ne estis listigita kaj do povus ĝin spekti nur tiuj, kiuj ricevis la ligilon. Xana do en la sabato mem enretigis sur iu kanalo *youtu.be* sed ankaŭ en *peertube*.

Fine en la vespero, Marcelo prezentis la filmon kaj ĝian E-version. Dankis al ĝiaj kontribuintoj. Tamen iuj el la ĉeestantoj ne povis samtempe spekti la filmon. Ĉiu devis unue enŝuti la filmon sur sia komputilo antaŭ ol rigardi ĝin. Bedaŭrinde ĉies retaliroj malsamas kaj tial du horojn poste nur malmultaj entute ĝuis la filmon. Sed ĉiuj, kiuj vidis, entute aŭ nur parte, tre kontentis kaj gratulis pro la kvalito de la laboro por la E-versio. Inter tiuj, Vinko Markov, la prezidanto de SAT kaj Pedro Sanz, iniciatinto de la afero.

Marcelo

ARTE FRANCE
Unité Société et Culture
Fabrice PUCHAULT
Anne GROLLERON
Administration **Sophie JOLLY**
Chargé de post-production **David DUCHEMIN**

PRODUCTION DÉLÉGUÉE
CINÉTÉVÉ

PRODUIT PAR
Fabienne SERVAN SCHREIBER
Sandrine MANCIET

AVEC LA PARTICIPATION DE
TV5Monde
Responsable du pôle **Christophe ASSEZAT**
fiction/documentaire

HISTOIRE TV
Directeur **Christophe SOMMET**
Responsable contenu et antenne **Élisabeth HAGSTEDT**
Chargée des acquisitions et **Sandrine VENTÉZOUT**
productions documentaires

ESPERANTIGO:
André **ARNOLD**
Nicole **BLOT**
Jan-Seb **BRILLEAUD**
Pjer **BUVJE'**
Janine kaj Yannick **DUMOULIN**
Miguel **FERNANDEZ**
Claudine **GUEGUEN**
Claudine **POMIROL**
Marcelo **REDULEZ**
Nathalie **RIGAUULT**
Pedro **SANZ**

SUBTEKSTIGO:
Yannick **DUMOULIN**

la teatra kaj kanta trupo de ESPERANTO-GIRONDE

De pli ol tridek jaroj LA KOMPANOJ kantas kaj kantigas en Esperanto. ESPERANTO-GIRONDE invitas vin kunhelpi al disvastigo de kulturo per Esperanto. Spite al moroziga pandemio, mojosigu vian ĉiutagon dank' al muziko kaj

Kantu en ESPERANTO!

Per la ĉi-kuna kupono ricevu altkvalitan materialon por kunfesti la centjariĝon de Brasenso kun LA KOMPANOJ.

ESPERANTO-GIRONDE proponas al vi provi ĝui Brasenson per speciala kantaro kun gitarakordoj kaj originalaj ilustraĵoj de Blaise Guinin, rezervita al La Kompanoj. Dulingva Fr-Eo - Formato 20x21 - 244 paĝoj.



BULTENO resendenda al ESPERANTO-GIRONDE

Ĉe Martine Edelbloude – 2 rue Raymond Lavigne 33100 Bordeaux / mabel1533@laposte.net

- Mi iĝas mem Kompano kaj ricevos la materialon por kunfesti la centjariĝon de Brasenso al la ĉi-suba adreso.....: 15,- €
- Mi partoprenas en la sendokostoj per: 5,- €
- Sume:,- €

Mi pagas per kunsendita ĉeko al ESPERANTO GIRONDE
 ĝiro al poŝtokonto : Crédit Agricole
 IBAN FR76 1330 6000 2523 0858 5669 369
 BIC AGRIFRPP833

Persona k. familia nomoj:

Poŝta adreso:

Kodo k. Urbo:

KONCIZA RAPORTO PRI TRIJARA BRASENSA PROJEKTO

Dum somero 2018 mi ekpensis pri eldono de kolekto de Esperantaj versioj de Brasensaj kanzonoj. Mi tiam konis iom pli ol dudek tradukojn. Okaze de la samjara ĝenerala asembleo, la membroj de Esperanto-Gironde larĝe aprobis la proponon iom pliampleksigi la kolekton vokonte helpontojn kun celo atingi kvardek, eble kvindek kanzonojn por publikigo okaze de la centjariĝo de Brasenso en oktobro 2021.

Kelkajn monatojn poste, la projekto bone evoluis dank' al la amika tradukrondo, kiu grandkvante produktis novajn tekstojn. Ĉiujn zorge kontrolis Janine kaj Marcelo kun gravaj helpoj de Silĉjo Barrier, Serĝo Sire kaj Yannick. Longaj debatoj kun la tradukintoj kaj inter ni daŭris dum tuta jaro kaj duono, ĝis komenco de 2020.

La projekto interesis ankaŭ respondeculinon de alternativa eldonasocio, lokan amikinin, kiu proponis kuneldonon, kondiĉe ke la libro estu du-lingva. Esperanto-Gironde favore akceptis tiun ideon. Kvankam ĝi duobligis la tutan laboron pro la duobla paĝokvanto, Monique, Janine kaj Klodin' zorge kontroladis la tajpadon de Marcelo. Sed fine, la franclingva eldonejo decidis ne partopreni en la projekto. Tamen nia projekto restis tiel kiel tuto.

Alvenis tempo por enpaĝigo. Sed per kiu taŭga programo? Post pluraj provoj mi frontis al problemoj de kongruenco kun mia komputilo. Sindikatista kolego helpis tiam solvi la problemojn.

Kaj aldoniĝis la sugesto enŝovi la muzikakordojn inter la versoj. Bona ideo! Sed ve! Jen plia malkongruenco: mankis litertipo por enŝovi konvenajn diezojn kaj bemolojn. Serge tiam post strebado kreis taŭgan litertiparon speciale por ni! Kaj fine de la jaro 2020 la sesdek-ses kanzonoj, originalaĵoj kaj tradukoj, estis enpaĝigitaj.

Inter la tre pozitivaj novaj kontaktoj, ni nepre salutu la ilustriston, Blaise Guinin, novlernanton. Profesia desegnisto, li dediĉis tutan monaton, januaron 2021, al nia kantaro, donante altnivelan econ tuj videblan, kiam oni tenas la libron en la manoj. Mankis kelkaj enkondukaj paĝoj. Majstra komparteksto far Janine, biografio far Klodin', prezento de La Kompanoj far Marcelo kaj rimarkinda enkonduko far Elvezio estis laste verkitaj. Ankaŭ la enhavo-tabelo kaj la indeksoj de la kanzonoj.

Ĉio estis preta por sendi al presejo fine de februaro 2021, se la internaciaj firmaoj Universal kaj Warner, nunaj posedantoj de la aŭtorrajtoj, favore respondus al niaj petoj senditaj jam komence de decembro 2020. Sed ni frontis al muroj kaj maldecaj sintenoj de tiuj arogantaj kolosoj, por kiuj nia projekteto ŝajnis tute seninteresa. Se la unuenomita postulis tute ne pageblan monsumon, la dua eĉ ne respondis al niaj telefonvokoj, retmesaĝoj kaj leteroj. Fronte al tiu fimalĝentileco,

Esperanto-Gironde post longa hezito decidis spite eldoni nekomerceblan libron, kantaron dediĉotan nur al internaj agadoj de membroj kaj subtenontoj de nia asocio...

Post pluraj esploroj dum la buĝetopreparo (dankegon al Serge pro lia grava monhelpo), ni elektis mendi la presadon al la presejo 3A (ankaŭ nomita Ravin bleu), kiu de dek sep jaroj presas la revuojn *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo* en la Pariza regiono. Meze de majo, post ricevo de ĉiuj bezonataj dosieroj, la respondeculo respondis: «Bone ricevitaj. Oni ekprizorgas.» Kaj ni do esperplene atendis la librojn por dispartigi ilin dum la someraj ferioj. Sed ve! Retrafis nin la sorto. Unu monaton poste, malgraŭ niaj insistoj, neniu kontakto plu eblis, neniu novaĵo venis. Ĝis kiam SAT eksciis, ke la presisto ĉesis sian aktivadon. Senaverte.

La solvon proponis SAT en Hispanio (SATEH): eldonejo Ulzama apud Pamplono. La kontakto estis tre bona kaj la komerca propono eĉ pli favora por nia kaso. En julio Ulzama sendis la unuan provaĵon. Sed ve! Nekomprenebla mispresado de la titoloj kaj kanzontekstoj estis denuncienda kaj resendo de ĉiuj dosieroj kun ĉiuj litertipoj ebligis sendon de dua provaĵo tute konvena, akceptita meze de aŭgusto. Kaj komence de septembro Klodin' kaj mi estis bonvenigataj en la presejo kaj post diskuto kaj vizito ricevis la skatolojn kun la 100 menditaj ekzempleroj. Mi tre fieris kaj kontente tenis propramane finfine nian libron. Sed ve! kaj re-ve! Fuĝe! 100 libroj rubujen! Kaj mi montris la misaĵojn. Ili presis la unuan version. Ni venis por preni la duan version. La tri virinoj estis konsternitaj sed komprenis la situacion kaj tuj proponis la solvon: ili proprakoste presos la bonan version kaj sendos la librojn al nia adreso. Ulzama fine eĉ kompensis finance, nepagigante la taksojn.

Kaj uf! nian laboron kronas bela rezulto. Nun ek al la posta etapo: la dispartigo de la kantaroj... (vd. p.8 la aliĝilon al La Kompanoj, por ricevi vian ekzempleron!)

Marcelo



Ilustraĵo de Blaise Guinin por
Brassens en Espéranto

EPOSA RAKONTO PRI LA BRASENSA PROJEKTO

Teksto kaj ilustraĵoj de Serge Sire

Enkonduko

Ĝis la paper-naskiĝo de la kanzona libro,
tri longajn jarojn poste de la Marcel-ideo
okazis epizodoj stumbligaj ja kun pipro
igante la Marcelan projekton epopeo.
Ĉi periodo ŝajnis sub bremsa de ĥimero
do el ĝi mi ekemis fariĝi nov-Homero
(verŝajne tro moderne, kaj kun pli da modesto).

Ekestis ĉi eposo ne vere tre epika
sed estu ĝi prefere humura kaj E-pika.
Konkludas l' epizodoj (dek unu en ĉi ĝesto)
citaĵoj de Brassens: ne nepre el kantaro
eĉ kiam ili estas, malsamas l' versa formo:
por tiuj de la libro ĉefiĝas la gitaro
dum tie aleksandro sin trudas kiel normo.


*Precipe ili estas la idoj de l' ĥimero
fervoraj soifantaj poetoj de l' ĉielo*
(« Les oiseaux de Passage » p.192)¹

01

De longe jam, ŝvebadis en la Marcela kapo
ideo tute stranga: la nombron de tradukoj
Brasensaj duobligi... Ĉu tio pro sun-frapo?
«Ne tiom stranga! - grumblis Marcelo pro la jukoj,
ĉar ĉi projekton nutros kanzonoj - ja kanteblaj,
sed nur kvar aŭ kvin dekoj: modestos ĉi kompilo,
sen zorgoj kaprompigaj kaj sen postuloj nepraj!»

La sekvo al li pruvis ke ne! Alarm ' gorilo!
(« Le gorille » p.46)

¹ La paĝonumeroj referencas al la libro eldonita de Espéranto-Gironde *Brassens en Espéranto*. (vidu p.8)



02

Franclingva eldonisto proponis kuneldonon se estos ĝi dulingva. Nu, duobligus tio paĝkvanton, kontroltaskon kaj eĉ sen melodio pro kostaj kopirajtoj la bezonatan monon.

Forestis l' eldonisto, sed restis la ideo.

Ĉu pro ĝi, oni risku la morton de la kreo?

Aŭ ĉu eldoni saĝe, do sole Esperante?

pro ĉi ide' se morti, nu bone, sed plej lante!

(« Mourir pour des idées » p.206)

03

Ĉar temis pri kanzonoj, aldoni notojn indus (ne nur pied-klarigajn sed ankaŭ ja muzikajn!)

aldoni partiturojn nin tro laborigintus nur metu ni sur tekston akordojn utiligajn por la akompanado, plej ofte per gitaro.

Sed ve! Bemolo grava aperis pro l' tiparo:

ĝi mise traktas plurajn simbolojn por muziko.

Kreadon de tiparo rigardas mi hobia

do mi pli taŭgan naskis, sub ŝildo de heliko!

Kun ŝildo ĉe la kleo, ŝveliĝus la La mia!

(« Le petit joueur de flûteau » p.152)

(daŭrigota)



GRAVA ANONCO

La 27an de septembro, post la kurso en Cenon, mi sukcesis paroli kun la deĵorantino en la akceptejo, al kiu mi demandis ĉu estas novaĵoj pri la estonteco de la kastelo Palmer.

Jen la respondo:

Pro la sansituacio, la afero estis en neaktiveco sed nur dormema. La urbeŝtaro de Cenon neniam rezignis definitive fermon de Palmer.

Laŭ la lastaj informoj la oficistoj devos transloĝi venontan union en alian konstruaĵon (renovigotan) de Cenon.

La atelieroj, kiuj okazas en la kastelo povos daŭri tie ĝis junio, poste ne plu.

La renovkonstruoj ankoraŭ ne komenciĝis sed la plano estas definitive fermi la kastelon ekde julio.

Rilate al tiu situacio, ŝajnas, ke urĝas pripensi pri estonteco de la sidejo de Esperanto-Gironde kaj aparte de la 4 ŝrankoj kun iliaj entenoj.

Delonge ne eblis kunveni kaj povas esti, ke la plejmulto el nia grupo forĝis tiun finon.

Klodin'

NIAJ KURSOJ

BONVULU ATENTI PRI TIO, KE POVAS OKAZI MODIFOJ PRO LA NUNA EPI-DEMIO. PREFERE TELEFONU POR KONI LA KONDIĈOJN DE LA KUNVENOJ.

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local atten-ant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi de 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), et une fois par semaine au collè-ge. Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ ani-mas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

LIBRO: HECTOR HODLER. UNE POSTURE PACIFISTE

Jen novaĵo: *Hector Hodler. Une posture pacifiste* de Marine Englert (dir.), Éd. Notari, 232 p., 36 CHF, okaze de la centjariĝo de la forpaso de la svisa fondinto de UEA. La eldono estas dulingva: franca–Esperanto. Verkis artikolon ankaŭ nia samideano Christian Lavarenne.

Jen artikolo de La Tribune de Genève:

Dans la famille Hodler, je demande le fils. Moins connu que son illustre géniteur, le peintre Ferdinand Hodler, Hector n'en demeure pas moins une figure genevoise passionnante du début du XXe siècle. Sa pensée à la fois ample et précise a profondément irrigué le mouvement espérantiste et les idéaux pacifistes de son époque, comme le révèle un ouvrage savant – et bilingue français-espéranto – fraîchement paru aux Éditions Notari sous la direction de Marine Englert.

C'est dès l'adolescence que s'exprime l'esprit vif et humaniste d'Hector Hodler, né en 1887 des amours de son père avec Augustine Dupin. Il a 15 ans quand éclate à Genève la grève générale de 1902, « déclenchée par solidarité avec les traminots victimes d'une compagnie américaine », expose l'historien Charles Heimberg dans *Hector Hodler. Une posture pacifiste*.

Les événements inspirent au jeune bourgeois un véhément pamphlet, où il affirme sa sensibilité face à la souffrance sociale et dénonce les violences dont on use pour mater la révolte ouvrière. « Son côté précoce et décidé est marquant, souligne Marine Englert, historienne de l'art. Il a eu très tôt une grande conscience des choses et lisait énormément. Dans ses carnets intimes, il mentionne avoir dévoré treize ouvrages de Zola en un an, entre 1905 et 1906. »

Universalité et égalité

Révélant une plume alerte, un autre texte inédit permet de saisir la pensée du jeune collégien. Intitulées « Autrefois et aujourd'hui. Lettre à l'ancienne Ille Classique actuellement au Purgatoire », ces lignes font « la critique cinglante de l'institution scolaire », selon l'historienne de l'art, mais contiennent également le fondement des idéaux d'Hector, en décrivant une école « utopique, qui se veut égalitaire et socialiste » – d'ailleurs, il quittera le Collège Calvin en 1907 sans être diplômé. Universalité, fraternité, collectivisme et surtout égalité, voilà les thèmes qui guideront toute son action.



MARINE ENGLERT

Hector Hodler

Une posture pacifiste / Pacisma sinteno

ÉDITIONS NOTARI

Or, ces notions sont aussi à la base de l'espéranto, ce langage international imaginé par le Polonais Ludwik Lejzer Zamenhof au cours des années 1870 afin de véhiculer un idéal de paix, de tolérance et de solidarité entre les hommes. Le jeune Hodler se passionne pour cette langue universelle. En compagnie de son ami et camarade de classe Edmond Privat, il approche le philosophe Ernest Naville, lequel avait « présenté et soutenu l'espéranto à l'Académie française des sciences morales et politiques en 1899 ».

« On suppose qu'Hector Hodler a eu connaissance des écrits de Naville par son père, bien introduit dans les cercles culturels », avance Marine Englert. Les deux garçons créent un club de jeunes espérantistes puis, en 1907, Hector prend la rédaction en chef de la revue « Esperanto » avant de fonder, l'année suivante, l'Association mondiale d'espéranto (UEA), dont il dirigera le siège à Genève. L'organisme est aujourd'hui établi à Rotterdam et compte des membres dans 120 pays.

Avec l'UEA, le journaliste entend démontrer que l'idéologie ne vaut pas sans pragmatisme: « Un idéal qu'on ne peut pas réaliser, même en partie, est socialement voué à l'échec », écrit-il. Des services pratiques sont développés ; durant la Première Guerre mondiale, près de 50 000 pièces de correspondance transitent par l'association afin de maintenir le contact entre les civils des pays belligérants.

Admiration mutuelle

Si Hector Hodler n'est pas devenu artiste, comme l'espérait Ferdinand, père et fils poursuivent toutefois les mêmes buts. À la quête d'universalité par la peinture de celui-là, dont le pinceau s'efforce de montrer « la ressemblance entre les êtres humains », répondent les recherches d'une compréhension entre citoyens du monde entier de celui-ci, d'après Marine Englert.

Complexe, leur relation s'avère néanmoins empreinte d'admiration mutuelle. Dans ses jeunes années, Hector pose beaucoup dans l'atelier paternel, ce qui lui vaut rétribution. Il y apprend aussi à peindre, comme en attestent les huiles et dessins reproduits dans l'ouvrage. Ils font ensemble de la musique et la tuberculose qui frappe Hector en 1912 – une malédiction familiale ! – exige de longs séjours à la montagne qui les rapprochent.

Hector mourra à Leysin en mars 1920, à l'âge de 32 ans. On doit la préservation des documents qui ont servi à l'élaboration du livre à sa veuve, Émilie Hodler-Ruch, très fidèle à la mémoire de son époux. *Hector Hodler. Une posture pacifiste* est le résultat du dépouillement de ce fonds conservé par les Archives Jura Brüscheweiler, couplé à la volonté de la Société suisse d'espéranto de célébrer le centenaire du décès de celui qui souhaitait tant que, au propre comme au figuré, tous parlent la même langue.

Elvezio Canonica

MIRINDA 150-JARA VISTERIO

La rimarkinda visterio de la pordego de la hotelo Ragueneau, kiu iĝis en 1939 la sidejo de la bordoza urbaj arkivoj (71 rue du Loup), daŭre mirigas la pasantojn. Precipe printempe, kiam florado bonodoras. Ĝia latina nomo estas *Wisteria sinensis*. Tiu plurjara (eĉ multjara) planto originas el Ĉinio kaj ŝatas malsekajn grundojn, varmetajn kaj prefere nekalkajn. Tial la origine marĉeca grundo de Bordoza aparte taŭgas por tiu liano, kies vasteco kaj cirkonferenco de la trunko ne devige signas maljunaĝon sed pli ofte vigecon. En publikaĵo koncerne la ĝardenojn en Bordoza, historiisto asertis, ke temas tie pri unu el la plej longtempaj en la mondo, estimante ĝian plantadon ĉirkaŭ la jaro 1758, do jam antaŭ la oficiala alporto de la planto en Eŭropon ĝenerale fiksita en 1816. Foto de la korto de la arkivejo atestas, ke en 1894 ĝi elmontris jam disvolviĝintan staton. Tial eblas estimi, ke la visterio de la hotelo Ragueneau estas 150-jara.

Hodiaŭ tiun visterion zorge flegas la ĝardenistoj de la urbo. Ĝiaj radikoj estis mistraktitaj de termitoj sed nun sin apogas sur protektilo.

Marcelo



(bildoj el google images)

LEGENDO PRI KOLĈIKO

Teksto de Carlo Agostini – itala esperantisto
(n. Monghidoro 1906 – m. Modena 1996)



Estis la sepa tago de la mondkreado. La bona Dio estis fininta sian imponan verkon. Ripozis la granda Demiurgo, turnante kontentan okulon al la mirinda kreitaĵaro de siaj manoj.

Ĉio estis bela, ĉio perfekta, ĉar ĉio korespondis al la eterna ideo-tipo, kies esprimo limigita, sed esence perfekta ĝi estis.

Kaj sian multeforman esencon la mondo malkovris per senfina gamo de koloroj sub la nova sunlumo, kaj per multesona harmonio vibranta en la ĉieloj.

Poste la Kreinta Spirito trakuris kiel lasta kareso super la frapantaj Oceanoj, kaj kvietiĝis sur la blankaĵo de la Alpaj vertoj, kaj sin turninte al la Oriento, al la suno jam alta, sed ne ankoraŭ tagmeza, signis per ama rigardo la vojojn de la estonto. Kaj de la Alpoj Italujo etendiĝis al la lulilo de la homaro, ekatendante.

Tiam sub Dia signo en nevidebla sulko agitiĝis la semoj de Jerusalemo, Ateno, Romo.

Eble "Pelmo" estis Lia ora trono, kaj ĉirkaŭ ĝi Tofanoj, Rosà, Pomagagnon, Cristallo, Sorapis, Croda da Lago, Tagmeza Beko levis timeme kaj scivoleme sian frunton, dum Reĝo Antelao, ornamita per sia blanka ermena peltto malkovris kaj klinis sian fieran kapon antaŭ la Dieca lumego.

Ĉio estis bona, ĉio estis bela.

Dio disverŝis ĉie trezorojn da beleco, kaj boneco, kaj vivfermentojn, kaj sopiron al sentempo.

La ĝoja tremo supreniradis kiel dankema incenso de la akvara ebenaĵo al la teroj fruktodonaj, al la granitaj turoj, al la neĝaj montpintoj ĝis la ĉiela stelartrono.

Ĉar, ja, la Pelma trono estis jam vakua: la Granda Rito jam estis finita, kaj la Kreinto estis supren iranta tra la spaco al la poluso de l' mondo, trans la polusa stelo.

Tiam okazis ke, superflugante Boite-on, Cortinan torenton, ridetante al la alvoko, al la sopiro de la verda smeralda konko, Li malfermis la manojn benantajn, faligante la lastajn juvelojn de la trezoro, per kiu Li estis beliginta la mondon. Kaj sur la tapiŝo de la herbejoj ekridis gencianetaj safiroj, ranunkolaj topazoj, rododendraj rubenoj, perlaĵ konvaloj...

Sed ĝuste en la lasta momento, vidante ke la sorĉo de la mirinda valo eble forgesigos al la homoj la ĉielon, Li ridetis malĝoje, kaj la tuta valo kovriĝis per la rozkolora, dolĉa melankolio de la kolĉikoj.

CARLO AGOSTINI



Reĝo Antelao / Il re Antelao - la dua pinto de la montara sistemo Dolomitoj (Italujo) 3 264 metrojn alta .



Eminenta latinisto, itala instruisto kaj lernejestro, sperta kaj aktiva esperantisto estis **Carlo Agostini**, la aŭtoro de ĉi tiu teksto – kiu ŝajnas laŭdo al Naturo kaj al kreitaĵaj belecoj. Li instruis la italan kaj la latinan lingvojn en itala lernejo en Bulgarujo (Sofio, Burgaso); de la jaroj 1955 ĝis 1957 li estis prezidanto de *Bolonja Esperanto-Grupo “Achille Tellini 1912” – GEB*; li gvidis multajn esperantajn kursojn en ĉiuj urboj, kien li transloĝiĝis pro laboraj kaj instruistaj kialoj.

Inter tiuj lokoj, estis ankaŭ *Cortina d’Ampezzo* (provinco de Belluno), kaj de tie – okaze de la 31-a Nacia Esperanto-Kongreso, jaron 1960-an – li invitis esperantistojn viziti kaj ĝui tiujn mirigajn naturo-spektaklojn de la montara sistemo Dolomitoj kie, inter somero kaj aŭtuno, belegaj floroj, el kiuj la *kolĉikoj*, kovras kaj kolorigas la montajn herbejojn, spontanee.

Kolĉiko estas bulba planto, tre antikva, konata en Italujo, kie ĝi enradikiĝas kaj kreskas laŭnature, kiu tre similas krokuson, sed – diverse de ĉi-lasta alia floro – ĝi estas venenega; pro tio oni devas atenti ne konfuzi unu kun la alia, ĉar kontraŭ la mortigaj toksinoj de kolĉiko tute ne ekzistas kontraŭveneno! Sed kolĉiko estas kreskaĵo aparte floranta en regiono Kolĉido, ĉe la suda bordo de Nigra Maro, sude de Kaŭkazo, la nuna Kartvelio, kaj de tiu loko devenas ĝia nomo (el la greka: κολχικόν / latina scienca nomo: colchicum / en la itala: colchico, colchico).

El la revuo L'Esperanto n. 64, jaro 1960, organo de Itala Esperanto-Federacio

El la itala blogo pionirojdesperanto

Elvezio





VOJAĜO AL PIRENEOJ

Victor Hugo (1843)

Dum somero 1843, Victor Hugo inkognite vojaĝis kun sia amatino Juliette Drouet al Pireneoj kaj Hispanio¹. Ili interalie etapis en Bordojo. Jen eltiraĵoj el lia rakonto.



Male al rivero Luaro, oni ne sufiĉe laŭdis Bordojon, aŭ almenaŭ oni ĝin malbone laŭdis.

Oni same laŭdas Bordojon, kiel oni laŭdas la straton de Rivoli: reguleco, simetrio, grandaj blankaj fasadoj kaj ĉiuj similaj unuj al la aliaj, ktp.; kio signifas por saĝulo sengustan arkitekturon, urbon vid-tedan. Nu, pri Bordojo, nenio estas malpli vera.

Bordojo estas stranga, originala, eble unika urbo. Prenu Versajlon kaj miksu kun ĝi Antverpenon, vi havas Bordojon.

Mi tamen esceptas el la miksaĵo – ĉar necesas esti juste – la du plej grandajn belaĵojn de Versajlo kaj Antverpeno, la kastelon de la unua kaj la katedralon de la alia.

Estas du Bordojoj, la nova kaj la malnova.

Ĉio en la moderna Bordojo esprimas grandecon, same kiel en Versajlo; ĉio en la malnova Bordojo rakontas historion, same kiel en Antverpeno.

Tiuj fontanoj, tiuj rostraj kolonoj, tiuj vastaj aleoj tiel bele priplantitaj, tiu Reĝa Placo², kiu estas tutsimple la duono de la placo Vendôme lokita akvorande, tiu ponto longa je kvarono da duonleŭgo, tiu superba kajo, tiuj larĝaj stratoj, tiu enorma kaj monumenta teatro, jen vidaĵoj, kiujn forviŝas neniu el la splendaĵoj de Versajlo kaj kiuj, en Versajlo mem, digne ĉirkaŭas la grandan kastelon, kiu ŝirmis la grandan jarcenton.

¹ : Victor Hugo, *Voyage aux Pyrénées*, Editions CAIRN, 2014

² : Nuntempe: Placo de la Borso

Tiuj labirintaj vojkruciĝoj, tiuj dedalaĵoj el pasejoj kaj konstruaĵoj, tiu strato de la Lupoj, kiu memorigas pri la tempo, kiam la lupoj venis vori la infanojn enen de la urbo, tiuj fortres-domoj iam hantitaj de demonoj laŭ tiom malagraba maniero, ke iu decido de la parlamento deklaris en 1596, ke sufiĉas, ke loĝejon vizitadas la diablo, por ke la lukontrakto estu plenrajte nuligita, tiuj tindrokoloraj fasadoj skulptitaj de la fajna Renesanca ĉizilo, tiuj pordegoj kaj tiuj ŝtuparoj ornamitaj per balustroj kaj tordaj pilieroj blue farbitaj laŭ la flandra modo, tiu ĉarma kaj delikata pordego de Caillau³ starigita memore al la batalo de Fornovo, tiu alia bela pordego de la urbodomo, kiu vidigas sian belfridon



tiel fiere pendantan sub aĵura arkado, tiuj senformaj stumpoj de la funebreca fuorto de Hâ, tiuj malnovaj preĝejoj, Saint-André kaj ĝiaj du spajroj, Saint-Seurin, kies frandemaj kanonikoj vendis la urbon Langono kontraŭ dek du petromizoj jare, Sainte-Croix, kiu estis bruligita de la normanoj, Saint-Michel, kiu estis bruligita de la tondro, tiu tuta amaso da malnovaj porĉoj, da malnovaj pinjonoj kaj da malnovaj tegmentoj, tiuj memoroj, kiuj estas monumentoj, tiuj konstruaĵoj, kiuj estas datoj, certe indus speguliĝi en rivero Skeldo, same kiel ili speguliĝas en Ĝirondo⁴, kaj grupiĝi inter la plej fantaziaj flandraj dometoj ĉirkaŭ la katedralo de Antverpeno.



Aldonu al tio, amiko, la mirindan Ĝirondon, embasatan de ŝipoj, mildan horizonton el verdaj montetoj, belan ĉielon, varman sunon, kaj vi amos Bordozone, eĉ vi, kiu trinkas nur akvon kaj ne rigardas belulinojn.

Tiuj ĉi estas ĉi tie tiel ĉarmaj, kun siaj oranĝaj aŭ ruĝaj madrasaĵoj, kiel tiuj de Marsejlo kun siaj flavaj ŝtrumpoj.

(daŭrigota)

Adaptis kaj esperantigis Janine

³ : Tiel!

⁴ : Temas kompreneble pri Garono.

BORDOZA MUMIO SAVITA DANK' AL KATO

Les momies de BORDEAUX sauvées par un chat



Par Jean-Philippe Mortier Agence ADARC gazette "Petites Nouvelles de chats" Bx.

La Mikaela tombokelo estis cirkla kaj mezuris verŝajne ĉirkaŭ dekon da metroj diametre. Ĝin oni kredis multe pli vasta, ĉar neniam ĝi estis lumigita. La gvidantino uzis nur kandelon. Kaj ŝin sekvis ŝia kato Viktor', kiu kapablis miaŭi en la taŭga momento, por aldoni teruraĵon se necese. Halto ĉe ĉiu mumio. Kaj la gvidantino komente precizigis pri certaj vundoj pro spadofrapo, jen dikventro pro grave-deco, aŭ malsano, kiun ŝi inventis je ĉiu vizito. Do, rekonstruo de pasinteco, kiu lasis vin perpleksa rilate vian propran estontecon foran, tre foran, mi esperas por vi...

Iam, televidoskipo alvenis por filmi la mumiojn. Tiom da teknologio perturbis la gvidantinojn, kiu unuafoje en sia vivo forgesis ŝlosi la pordon de la tombokelo. Sed Viktor', la kato, kutimis dormi en la kelo. La maljunulino en angulo aranĝis por ĝi la bezonatan komforton: kuŝejo kun malnova litkovrilo kaj sufiĉe da nutraĵoj, eĉ tro spite al misdigesto. Viktor' mem favordonis al si la nomon granda gardisto de la piramidoj kaj la rajton varti sian tutan mumiaron. Ĝi ja sentis sin digna je nobela katgento el Egiptio kaj tre grave ŝajne ĝi konsideris la mumiojn kiel faraonajn.

La morgaŭon matene, iun sabaton, malferminte la tombokelon, Ernestina, tiel nomiĝis la gvidantino, konsterniĝis. La kapo de unu mumio malaperis. Ankaŭ ŝia kato. Pli ĉagrenita pro la perdo de sia kato ol perdo de mumikapo, Ernestina ekvokis al Viktor' ĉirkaŭ la sakturo kaj iom post iom plivastiĝis ŝiaj esploroj ĝis la

afrika bazaro sur la apuda placo.

Tie pro eksterordinara hazardo ŝi aŭdis miaŭojn de sia kato Viktor' responde al siaj alvokoj. Tiam Ernestina konsterniĝis kaj bezonis kelkan tempon antaŭ ol trovi siajn fortojn.

Tie sur la budo, apud kiu staris fortika senegalano karesanta ŝian katon, la maljuna gvindantino retrovis sur soklo la kapon de la mumio. Skandalo! Furoro! Senmezura situacio ĝis altporfida krimo! Ĉiuj hatosentoj koliziiĝis en la menso de Ernestina. Tiam fulmrapide ŝi eksturmis kontraŭ la kompatindan senegalanon, blekante al li ĉiujn nomojn de birdoj, koleopteroj, kaj inter ili eĉ troviĝis amaso da, kiun ĝentileco mutigas en ĉi artikolo.

Sekve per elano inda je rugbeano, ŝi prenis la kapon kaj pretis ĵeti ĝin sur la senegalanon, kiam feliĉe ŝin perforte regis kelkaj afrikanoj, kiuj ŝin raciigis, kvietigis per tiu antikva filozofio, kies sekreto ili posedas. La sekvo estis krome «*disput-burleska*».

(daŭrigota)

Marcelo



Gvidiantino vizitigas la kelon de la mumioj. Ĉu Ernestina?

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / mabel1533@laposte.net

* * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

